NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎: 944.164.492
☎ portebla: 696.613.958
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

NOVEMBRO/DECEMBRO 2002

ZAMENHOFA FESTOTAGO.

Kiel ordinare kiam proksimiĝas la 15-a de decembro, ankaŭ ĉi-jare ni festos en nia klubo la Zamenhofan Tagon. Tiel do la 14-an de decembro, sabate, ni invitas ĉiujn asocianojn kaj simpatiantojn partopreni vespermanĝon en nia klubo - ĉiu kontribuu al ĝi laŭvole! -, ĝui sukan Esperanto-etoson kaj babili pri la esto, estinto kaj estonto de nia lingvo. Jen la provizora programo de la vespero:

- Inter la 18:00 kaj 21:00 praktika prezento pri la funkciado de Esperanto-Babilejoj. Tio estas, per la helpo de komputilo kaj danke al la Interreto, vi povos ret-korespondi simultane kaj en reala tempo kun aliaj esperantistoj tra la mondo. Jen okazo, kiun vi ne povas mistrafi por kontatiĝi kun novaj teknologioj kaj ĝiaj ebloj aplikitaj al nia lingvo. La prezenton gvidos niaj asocianoj Patxi de la Hoz, David Mediavilla kaj Sabin Orueta.

- 19:30: komuna vesper-manĝo (al kiu bonvenas kontribuoj...).

No lo olvides: el próximo **sábado 14 de Diciembre, a partir de las 18,00 h.**, nos reuniremos, como ya es tradición, para celebrar el aniversario del nacimiento de Zamenhof, creador del Esperanto.

Después de la presentación del funcionamiento de un foro en Esperanto a través de Internet, tendrá lugar un debate, que continuaremos alrededor de una mesa, llena con la comida que aportemos todos los participantes.

LOTERIA DE NAVIDAD.

Si al llegar estas fechas nos solemos reunir en el Grupo para celebrar el nacimiento de Zamenhof, igual de tradicional es la lotería de Navidad. Desde hace varias semanas están disponibles las participaciones, primeras que hacemos en euros. El número jugado es el **48.759**. Cada participación cuesta 3 euros (2,50 de lotería y 0,50 como donativo al Grupo) más gastos de envío (2 e.)

FIASKO PRI ORGANIZO DE NOVA E-KURSO.

Pro manko de gelernantoj, ĉi jare ne eblis al ni organizi E-kurson. Leteroj estis sendataj al ĉiuj amaskomunikiloj de Bilbao kaj la instruonto, David Mediavilla, pendigis diversajn afiŝojn sur la muroj de diversaj fakultatoj de la Universitato, sensukcese. En januaro denove ni faros propagandan kampanjon en la lokaj amaskomunikiloj kun la celo altiri novajn gelernantojn.

EŬROPA KONGRESO EN BILBAO.

En la jaro 2004 okazos en Bilbao la 6ª eŭrop-unia Esperanto-kongreso, laŭ peto de la respondeculoj de la brusela oficejo. Ĉi-jare ĝi okazis en Verona kaj ĝin partoprenis du biibaoanoj. Kutime, ĝi okazas nur kiam UK transiokiĝas for de Eŭropo; en tiu jaro, 2004, UK estos en Pekino.

Dum la venontaj monatoj, daŭre ni informos vin pri la evento; tamen, gravas ekde nun konscii pri la graveco de tiu kunveno, ne nur por la esperantistoj, sed ankaŭ por nia urbo mem. Pro tio, ni ĉiuj devas jam pensi pri la maniero helpi al organizado kaj realigo de tiel grava evento.

NOVA E-KURSO ĈE HISPANA UNIVERSITATO.

Niaj samideanoj el Asturio organizos novan kurson de Esperanto en la Universitato, laŭ la samaj kondiĉoj ol tiuj jam ekzistantaj en Kanariaj Insuloj, Barcelono kaj Bilbao.

NOVA POŜVORTARO POR HISPANLINGVANOJ.

Kadre de la 61ª Kongreso de HEF, estis prezentita, far de la aŭtoro mem, la nova poŝvortaro "2002". Kun 474 paĝoj kaj iom pli granda formato (17x11 cm.) ol la ĝis nun vaste uzata "Lexicón" (eldonita de "Sopena" en 1967), ĝi signifas la uzon de modernaj vortoj ne aperintaj en tiu-ĉi, korektadon de kelkaj eraroj kaj forgeson pri vortoj ja kadukaj. La 9an de novembro, la aŭtoro, Miguel Gutiérrez Adúriz, vizitis nian klubejon kaj alportis kelkajn ekzemplerojn. Do, vi havas la eblecon jam aĉeti en nia grupejo tiun ĉi laŭdindan verkon.

EN MADRIDO, DU NOVAJ STRATOJ PORTOS ESPERANTISTAJN NOMOJN.

HEF kaj la madrida E-liceo skribis leteron al la madrida Magistrato apogante la peton de omaĝo al **Cayetano Redondo**, esperantisto kiu estis urbestro de Madrido dum la hispana milito kaj, samtempe, ankaŭ al du aliaj historiaj esperantistoj: **Julio Mangada kaj Emilio Herrera**. La urbestraro respondis kun konfirmo, ke strato de nova kvartalo, nome Sanchinarro (Fuencarral), portos la nomon "Alcalde Cayetano Redondo".

Pri la du aliaj, jen la respondo: Mangada. Medalla de Oro por acuerdo 21-8-1936 *"quedando de esta manera ampliamente reconocida y honrada su figura"*. Emilio Herrera *"cuya trayectoria, sin duda, fue relevante, no parece actualmente el momento oportuno para efectuar su reconocimiento al no coincidir ningún aniversario o efemérides que conmemorar en relación con su biografía"*.

Pri tiu ĉi lasta afero, la Fondaĵo Herrera konfirmis al Tonyo del Barrio ke venontjare estos la 100-jara datreveno de la aviado en Hispanio, kaj oni kunmemoros ĝin vaste; tial, ili mem petos agnoskon por la figuro de Herrera. Pri Mangada, estas klare ke ni mem devus organizi ĉion. Intertempe, mi trovis anoncon de oktobro 1936 en ĵurnalo "La Voz", fare de Hispana Esperanto-Asocio, petante donacojn por starigi al "generalo" Mangada la tabulon pri kiu ni parolis en alia NV-numero. Sed ni ankoraŭ ne trovis mencion pri la starigo mem de la "fama tabulo".

Kaj kial en la titolo ni parolis pri "du" stratoj?: Ĉar en la mapo de la menciita kvartalo Sanchinarro alia strato portos la nomon de prezidinto de Unua Respubliko Pi i Margall, ŝajne la unua kiu publike parolis pri Esperanto en Hispanio. (Raportas Tonyo del Barrio)

(Prenita el "Nia Voĉo". Madrido, novembro 2002)

LA KONGRESO DE LA Ĉ.K.P. EN ESPERANTO.

Laŭ informis Mike Leon kaj Ulrich Matthias en soc.culture.esperanto, la retpaĝaro de la 16a Kongreso de la Ĉina Komunista Partio aperas en pluraj lingvoj, inter kiuj troviĝas Esperanto.

Pluraj ĵurnaloj en la mondo (escepte "El País", "of course") diskonigis la novaĵon. Jen la retadresoj: www.16congress.org.cn (ligiloj al pluraj lingvoj)

En Esperanto: http://www.16da.org.cn/world/world-16/index.htm

(Informis: Darío Rodríguez, per retpoŝto).

VORTARO DE FERNANDO DE DIEGO.

Augusto Casquero sendis, per la ret-poŝto, la jenan informon:

Kiel vi ĉiuj scias, estas intenco eldoni la Grandan Vortaron Hispana-Esperanto, de Fernando de Diego. Tiu verko estas unu el la plej gravaj produktitaj en nia movado de antaŭ multe da jaroj, kaj ĝi ampleksos pli ol PIV; enhavas 50.000 enirvortojn, kun klarigoj, frazoj, ekzemploj, ktp.

La kosto de la eldono ne permesis ĝis nun eldoni ĝin. Pro tio mi lanĉas kampanjon por klopodi atingi la necesan monon kiel eble plej baldaŭ. La buĝeto estas 13.000 eŭrojn. Do, mi petas al ĉiu unuopa samideano, asocioj, sponsoroj, privataj kaj publikaj institucioj, aliĝi al ĉi-tiu kampanjo por tuj eldoni tiun mirindaĵon.

Se ofertoj alvenus, oni malfermus apartan konton tiucele, ĉe Hispana Esperanto-Federacio aŭ ĉe Valencia Esperanto-Federacio. La aperigo de la vortaro estos en si mem omaĝo al nia elstara Fernando de Diego.

LASTA INFORMO (*alveninta de Miguel Gutiérrez Adúriz per ret-poŝto*).

Finfine, eblas jam antaŭmendi la "Gran Diccionario Español-Esperanto" de Fernando de Diego, kiun oni prezentos al la publiko la 15an de julio 2003 en Valencio, okaze de la 62ª Hispana Kongreso.

Tre similos al tiu de la nova "PIV", laŭ nombro da paĝoj kaj formato, sed ĝia fina prezo estos nur 45 eŭroj.

Tamen, se vi antaŭmendus, ŝparus 15 eŭrojn, ĉar per tiu antaŭmendo la prezo draste falas ĝis ... 30 eŭroj!, plus sendokosto. Dezirindas ke la grupoj kaj asocioj zorgu pri la akiro de mendoj en siaj respektivaj regionoj, kun la celo ŝpari.

NOTO: Laŭ konsilas nia amiko Miguel G. Adúriz, vi povas jam antaŭmendi tiun gravan verkon de Fernando de Diego pere de la E-Grupo de Bilbao. Kiel kutime, estos Iñaki Vélez, kiu okupiĝos pri kolektado de la mono kaj posta mendo de la libroj.

LA GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO DEZIRAS, AL VI ĈIUJ, KIEL EBLE PLEJ DA FELIĈO DUM LA JARFINAJ FESTOTAGOJ KAJ DUM LA VENONTA JARO 2003. TUTKORE.